

Enketo de la ŝtato Neuchâtel pri la bezonoj de la junularo, 5-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 537, 1974.01.23 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Oni multe parolas pri la junularo. Sed ĉu oni bone konas ĝin ? Ni raportis pri la organizo de grava enketo, kiu tuŝis en 1971 sep procentojn de la junularo 16-20-jaraĝa de la kantono Neuchâtel. La proporcio de la demanditoj respegulas la ĝeneralan socian situacion de la samaĝa junularo, el tio la valoro de tiu enketo, kiun gvidis sociologo kaj statistikisto, kiun subvenciis la Registaro kaj kiu ricevis la kunlaboron de multaj organizaĵoj, inter kiuj junularaj societoj.

A.- Laŭ la rezultoj de tiu enketo ni priskribos hodiaŭ la sintenon de la neŭŝatela junularo rilate al la **religia kaj politika vivo**.

Cl.- 50 procentoj de la gejunuloj deklaras, ke ili kredas je Dio ; 20 procentoj, ke ili ne kredas je Dio ; 30 procentoj, ke ili ne scias, ĉu ili kredas aŭ ne kredas. Kun la aĝo kreskas la nekredemo.

A.- Koncerne al la praktikado de la eklezia vivo oni ricevas la ĉi sekvajn respondojn : 20 procentoj de la gejunuloj regule iras al la preĝejo, 20 procentoj de tempo al tempo, 20 procentoj malofte kaj 35 procentoj neniam. La knabinoj montriĝas multe pli fidelaj al la eklezia vivo, ol la knaboj, kaj la junaj kompare al la pli maljunaj.

Cl.- 20 procentoj de la gejunuloj asertas, ke ili preĝas ĉiutage. 30 procentoj neniam preĝas. 45 procentoj en iaj cirkonstancoj. La praktiko de la preĝado malkreskas kun la kresko de la aĝo. La knaboj malpli preĝas, ol la knabinoj, kaj la studentoj, ol la metilernantoj.

A.- Dum la enketo aperis en la kantono Neuchâtel nova religia praktiko inspirita de la orientaj hinduaj religioj. 5 procentoj de la gejunuloj sin deklaras forte influataj de iuj orientaj religioj, dum ĉiuj ceteraj ŝajnas resti fidelaj al la tradiciaj kredoj. En la kantono, kie oni nombras po 1 katolikon por 2 protestantoj, la gejunuloj je 35 procentoj sin deklaras katolikaj kaj je 60 procentoj protestantaj, kio tute respegulas la plenkreskulan situacion.

Cl.- Ni forlasu la religion por raporti pri la sinteno de la gejunuloj rilate al la politika vivo. Laŭ la ricevitaj respondoj oni rimarkas, ke la gejunuloj ne tre bone konas la politikajn instituciojn de la lando. Ili tamen montriĝas tradiciemaj kaj malmulte influataj de la eksterlandaj reĝimoj, pri kiuj oni tamen multe raportas en la televidaj kaj radiaj elsendoj. Estas fakto, ke la ekstera politiko estas ĝenerale pli facile komparebla, ol la interna politiko, kiu disvolviĝas je tri niveloj, tiu de la loka vivo aŭ komunumo, tiu de la regiono aŭ kantono, kaj fine tiu de la nacio aŭ federacio.

A.- Koncerne al la grandaj politikaj problemoj nun debatataj en Svislando, tiuj de la fremdaj laboristoj kaj de la loĝejoj ĉefe malkontentigas la gejunulojn. Pri la privata posed-raĵto kaj pri la industriaj problemoj la gejunuloj diras sian nescion.

Cl.- La interesiĝo pri la politiko kreska kun la aĝo. La knaboj ĉiam montriĝas pli interesataj, ol la knabinoj. La knaboj malpli ol 18 jaraĝ interesigas pri la politiko je nur 5 procentoj. Post du jaroj 45 procentoj de la knaboj interesiĝas pri la politiko.

A.- 20 procentoj de la demanditoj jam scias, por kiu politika partio ili voĉdonos, kaj tiuj partioj viciĝas tiel : social-demokrata, kiu ricevas la absolutan plimulton, poste sekvas la komunista partio, la radikala partio, la liberala partio, kaj du dekstremegaj partietoj.

Cl.- Ŝajnas, ke la gejunuloj malofte parolas inter si pri politikaj temoj, escepte en la studentaj rondoj.

A.- En Svislando, kie la voĉdonoj abundas, la sindeteno estas tikla problemo. Montriĝas, ke ankaŭ la gejunuloj tendencos neregule iri voĉdoni. 45 procentoj de la gejunuloj iros regule voĉdoni, 45 procentoj kelkfoje, 10 procentoj ne iros. Ankaŭ la knaboj pli facile iros, ol la knabinoj.

Cl.- 5 procentoj de la gejunuloj jam sufiĉe interesiĝas al la politika vivo por antaŭvidi sian aliĝon al politika partio. 65 procentoj ne aliĝos.

A.- Estis proponitaj al la gejunuloj la elekto inter diversaj politikaj reĝimoj A ĝis G. 50 procentoj de la elektoj iris al reĝimo komparebla al la svisa reĝimo, sed kie la laboristoj estas ricevintaj la rajton decidi pri la organizo de sia laboro kaj gvidado de sia labor-entrepreno.

Cl.- En alia demando la gejunuloj devis diri, ĉu ili havas altiron por aliaj reĝimoj, kaj estis donitaj land-nomoj de la plej tipaj landoj : Sovetio, Usono, Ĉinio, Kubo, Israelo, Skandinavio. 75 procentoj de la gejunuloj diris, ke ili ne interesiĝas pri tiuj landoj, nur 5 procentoj menciis Usonon kaj Skandinavion. Ĉiuj ceteraj landoj ricevis nul procenton. Tio respegulas tipan svisan sintenon, kiu estas karakterizata de manko de intereso por la politika vivo en la ceteraj landoj.

A.- En Svislando oni nun multe parolas pri la problemo de la milit-rifuzantoj, kiuj estas enkarcerigataj kiel krimuloj. 70 procentoj de la gejunuloj estas favoraj al la starigo de politika statuso por la milit-rifuzantoj. La plej koncernataj de tiu problemo estas la studentoj. Ankaŭ la knabinoj esprimis la deziron sin esprimi, kvankam ili ne milit-deĵoras.

Cl.- La venontan semajnon, sur la bazo de la sama enketo pri la junularo en la kantono Neuchâtel, ni vidos, kion la gejunuloj opinias pri la geedziĝo, pri la seksa vivo kaj pri la infanoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!